

# LINGVO INTERNACIA

MONATA GAZETO POR LA LINGVO ESPERANTO.

ELDONATA DE LA KLUBO ESPERANTISTA EN UPSALA.

Kosto de abono por jaro:	Pago por anoncoj:
kronoj 3,00 = germ. markoj 3,30 = cendoj 75	15 öre = 15 pfenigoj = 20 centimoj =
= frankoj 4,25 = rejsoj 1000 = rubloj 1,50.	8 kopekoj — por duonpaĝa petitlinio.

Adreso de la redakcio: *Klubo Esperantista, Upsala, Sverige.* (Svedujo.)

III: a jaro.

Novembro 1898.

N: o 11 (35).

## Hospitium.

En N: o 10 (34) de "Lingvo Internacia" s-ro Postnikov projektis interalie la konstruon de 1 esperantistaj hoteloj por faciligi la proksimiĝon de 1 esperantistoj kaj plifortigi la signifon kaj utilon de nia kara lingvo.

Tute konsentante la pensojn de 1 estimata projektanto pri la signifo kaj utilo de liaj hoteloj, mi ne dubas, ke pli-malpli baldaŭ similaj konstruaĵoj ekzistos en ĉiuj pli loĝitaj punktoj de 1 tera globo, proponante gastamon al la vojaĝanta esperantisto kaj servante kiel kluboj por la lokaj anoj de 1 granda ideo. Mi nur ne povas tiel optimiste supozi, ke similaj hoteloj estos por ni konstruitaj en tre proksima tempo, ĉar niaj rimedoj, bedaŭrinde, ne pligrandiĝas danke al niaj bonaj intencoj. Pasos ne unu jaro antaŭ ol en Peterburg aŭ en alia loko altiĝos la utiliga duetaĝa ŝtona hoteleto. La ekzemplo de 1 rusaĵoj (*cerkovj*), konstruataj per kupraj "kopekoj" de 1 malriĉa vilaĝano, ne konvinkas min, ĉar tiuj ĉi malgrandaj kopekoj estas kolektataj inter tre grandaj milionoj de 1 rusa ortodoksa loĝantaro, kaj la grandaj milionoj da esperantistoj... estas ankoraŭ en tre juna aĝo. Tio ĉi, kompreneble, ne devas malgrandigi la oferemecon de niaj amikoj, ĉar, mi ripetas, la afero estas tre bona kaj plenumbla. Mi eĉ konsilus al ĉiu esperantista societo konservadi regule ian malgrandan sumon el siaj enspezoj por la simila celo\*).

Sed ĝis en ĉiu urbo estos simila konstruaĵo. ni povas, ŝajnas al mi, uzi alian rimedon por faciligi la internaciajn komunikiĝojn kaj malpligrandigi la koston de 1 vojaĝo por ĉiu esperantisto. Tiu ĉi rimedo ekzistis jam en griza antikveco, ĉe romanoj, kaj estis nomata *hospitium*. *Hospitium* estis gastamo (de *hospes* = alilandano, aliurbano, vojaĝanto, nekonata). Fari kun iu *hospitium* (*hospitium cum aliquo facere*) signifis konatiĝi kun iu, sed nepre kun la kondiĉo de 1 reciproka gastamo. Mi loĝas, ekz., en Odeso, s-ro N.

\*) Odesa Filio de Societo "Espero" decidis konservadi 10 % el ĉiuj siaj enspezoj por formi netuŝeblan kapitalon, kiu iam povos esti uzita por akiri propran loĝejon.

loĝas en Parizo. Se mi faris *hospitium* kun s-ro N., tio ĉi signifas, ke s-ro N., vizitante Odeson, venos en mian hejmon, loĝos tie dum sia estado en Odeso, uzos mian gastamon, kaj proponos al mi la samon, kiam mi venos en Parizon. Al mi ŝajnas, ke tiu ĉi bonega kutimo de l' antikveco estus tre utila en nia tempo kaj anstataŭigus ĝis certa grado la projektatajn hotelojn (kiuj, tamen, ne perdas danke al tio sian signifon).


Tial mi proponas, ke ĉiu esperantisto, konsentanta mian ideon, skribu al la redakcio de "Lingvo Internacia" pri sia deziro fariĝi ano de l' *Ligo de Gastamo*. Li havos tiam la rajton uzi la gastamon de aliaj membroj de la ligo, t. e. ricevi de ili loĝejon en ilia urbo, tagmanĝon, informojn k. t. p., kaj *devos* proponi la saman al aliaj liganoj, kiam ili venos en lian urbon. Kompreneble, ke niaj amikoj ne devas esti postulemaj kaj, uzante la gastamon, ili devas esti kontentaj je la plej necesa. Kompreneble ankaŭ, ke ĉiu ligano, deziranta uzi la gastamon de la alia, devas sciigi lin ĝustatempe pri tio, kaj ne veni "kiel neĝo sur la kapon", ĉar povas ja okazi, ke la sola ĉambro, ke la sola lito, difinita por la gastoj, estas jam okupita per alia pli frue veninta ligano.

Oni eble rediros, ke la gastamo ĉiam ĝenos la gaston, ke nenia gasto sin sentos tiel libere, kiel loĝanto de ia hotelo, ke li ĉiam timos trovi la gastamon kaj transiri la decajn limojn de l' postulemeco. Tio ĉi estas vera ĝis certa grado, sed mi pensas, ke malgraŭ tio mia propono ne perdas sian signifon, ĉar pli bonan ni nun ne havas. Kaj ĉiu ligano devas memori, ke uzante la gastamon de l' alia, li ne akceptas servon neredonotan, ke li mem promesis la saman gastamon al ĉiuj liganoj, kiuj bezonas ĝin, kaj ke, sekve, tiu ĉi lia gastamo tute anstataŭigas la pagon en ia hotelo.

Ĉu troviĝos aliaj esperantistoj, kiuj deziros fariĝi anoj de la ligo, nun proponata, aŭ ne, mi nun jam anoncas, ke mi ĉiam kun ĝojo proponos gastamon al ĉiu esperantisto, kiu anoncos en "Lingvo Internacia"\*) pri sia deziro fariĝi ligano, kaj kiu sciigos min letere pri sia alveno. Mi ne povas promesi lukson, ĉar mi mem ne ĝuas ĝin. Mi promesas nur liton por la nokto, nutraĵon dum la tago kaj ĉiujn informojn en nekonata urbo. Mi pensas, ke por multaj la vivo en amika familio estos eĉ pli agrabla, ol en ia gastodomo, kie oni havas nenian konaton, kvankam, sendube, oni povas tie havi pli da komforto kaj pli da trankvilo. Kredeble ankaŭ la proponata de mi *hospitium* montriĝos sufiĉe potenca ilo por fortikigi tiujn ligojn de amo kaj amikeco, de ĉiuhoma frateco, kiujn kun mirinda facileco oni faras per nia potenca Esperanto.

#### V. Gernet,

Rusujo, Odessa, Bolŝaja Arnautskaja, N:o 36.



## Novajoj.

### Esperanto kaj medicinaj societoj.

Rusujo, urbo *Borisogbebsk* de gubernio *Tambova*, 8/20. X. 1898.

En la redakcion de "Lingvo Internacia".

En nia urbo estas societo de kuracistoj, oficiale konfirmita kaj konsistanta el 30 efektivaj membroj-kuracistoj kaj unu membro-konkurantulo (ne-

\*) Kies redakcio ne rifuzos presi en sia "Informejo" la nomaron kaj adresaron de la liganoj.

kuracisto). Hieraŭ 7/19. X. 1898 en kunsido de tiu-ĉi societo mi tralegis la rusan tradukon de la artikolo "La alvoko" el "Lingvo Internacia" N:o 6—7 kun necesaj antaŭaj klarigoj. Post la tralego mi min turnis al la aŭskultantoj kun la demando, — ĉu ili deziras subteni la proponon de Odesa esperantista societo allasi la lingvon esperantan en la estonta medicina kongreso de 1900 jaro en Parizo por raportoj kaj disputoj, kaj la apudestantoj, post komuna prijuĝado de la demando, petis min konatigi ilin kun la gramatiko de la lingvo Esperanto kaj ĝia konstruo entute. Mi plenumis laŭforte ilian peton, kaj post kelka tempo de interparolado ili donis al mi la respondon jesan kaj enportis en la ĵurnalon de kunsido la sekvantajn liniojn:

"En la komuna kunsido de 7:a oktobro 1898 jaro Borisoglebska medicina societo, elaŭskultinte la sciigon de la membro-konkuranto Kazi-Girej pri la propono de societo esperantista en Odeso — decidis: dezirinda estas, ke en interanciaj medicinaj kongresoj estu allasita la lingvo esperanta por raportoj kaj disputoj, ĉar esperanta lingvo estas tre atingebla kaj oportuna por ellernado kaj komprenado de raportoj. Dezirinda estas, ke ankaŭ plej gravaj laboroj de la scienculoj estu eldonataj en esperanta lingvo.

La prezidanto: doktoro *Maslovskij*.

La sekretario: doktoro en medic. *M. Lebedev*."

Sciigante tion-ĉi mi povas aldoni, ke entute la societo rilatis tre favore al mia raporto kaj tre ekinteresiĝis por Esperanto.

Krom tio mi devas sciigi ankaŭ, ke mi min turnis letere al unu doktoro, loĝanta ĉiam en gubernia urbo Voroneĵ, kun la peto tralegi la tradukon de artikolo "Alvoko" ankaŭ en loka kuracista soceto kaj ricevis tre favoran respondon, en kiu doktoro F. sciigas min, ke li kun plezuro plenumos mian peton kaj en plej proksima kunsido tralegos la artikolon kaj donos necesajn klarigojn, se mi nur donos al li la materialon. Hodiaŭ mi sendas al li ĉion postulatan. Pri la rezultato mi sciigos en deca tempo. Nesuperflue estas aldoni, ke en urbo Voroneĵ estas du societoj medicinaj, kaj unu el ili eldonas ĉiusemajnan medicinan gazeton.

\*

En 13/25. X. 1898 la artikolo "Alvoko" (el n:o 6—7 de "L. I.") en rusa traduko estis tralegita en la jara kunsido de Voroneĵa Societo Medicina; la artikolon tralegis kun necesaj klarigoj loka doktoro K. Fedjajevskij. La sciigo estis aŭskultita kun intereso kaj en la ĵurnalon de la societo estis enskribita la decido, simila al la decido de Borisoglebskaj kuracistoj. Kiam mi ricevos la precizan kopion de tiu ĉi decido, mi tuj ĝin sendos en la redakcion de "L. I."

Nun mi klopodas pri tralego de tiu ĉi artikolo en Societoj Medicinaj de urboj Orel, Tambov kaj Ĥarkov. Pri la rezultatoj mi sciigos en deca tempo.

Inĝeniero **Nikolaj Kazi-Girej**.

\* \* \*

### Kursoj publikaj de Esperanto.

L'Espérantiste komunikas, el letero de s-ro E. Roux, la sekvantan novaĵon: "Mia kurso de Esperanto ĉe la *Unuiĝantaro de l' Komerco kaj de l' Industrio*, en Grenoble, estas pli oficiala ol iam. Ni havas la plezuron vidi ke ĝi estas anoncata, kiel la aliaj, sur ĉiuj programoj, prospektoj, afiŝoj,

k. t. p. Tuj de la venonta jaro, mi volas diri la nunan lernejan jaron, premioj estos aljuĝataj al la plej meritantaj de mia kurso.“

Al la redakcio de l'Espérantiste s-ro Blanche sciigis, de sia flanko, la reprenon de sia kurso Esperanta, ĉe la *Klubo Poliglota de Bruselo*. La kunidoj okazos en la lundo ĉiusemajne, de la 8-a ĝis la 9-a horo vespere. La kurso estos plena post *dek horoj de lecionoj*.

\* \* \*

### Ĉerpoj el la Kroniko de l'Espérantiste.

*O Paiz*, ĵurnalo de Rio de Janeiro kaj la ĉiutaga organo plej grava en tuta Sud-Ameriko, turnis la atenton de siaj legantoj al la longa artikolo, tiel rimarkinda, kiun s-ro Medeiros e Albuquerque skribis en la Maja kajero de *l'Revista Brasileira*, tiel pri la demando koncerne lingvon internacian, kiel pri Esperanto.

Samtempe *O Paiz* anoncas la aperon de l' bonega lernolibro, kiun doktoro da Costa e Almeida verkis por la popoloj uzantaj la lingvon portugalan kaj volantaj lerni Esperanton.

Ni revokas al la memoro de niaj amikoj ke ili havas, en tiu libreto, perfektan ilon de propagando kontraŭ ĉiu, kiu scias la lingvon portugalan.

Ni same rememorigas al la amikoj ke ili povas oportune disvatigiadi nian karan lingvon en Hungarujo per la helpo de l'Esperanta lernolibro, kiun s-ro A. Barabás faris por Maĝjaroj. En la okazo, se ili volus ekligi interrilatojn kun tiu popolo, kies lingvo estas tiel diferenca je la niaj, ili havas per tiu lernolibro la certan rimedon esti komprenataj de ĉiu hungaro meze intruita.

Ni ne povas tro multe rekomendi al ili, kiel plej bonan ilon de propagando, la sendon de letero simpla en Esperanto, akompanata ĉu de la lernolibro, ĉu de l' malgranda vortaro en la lingvo de l' adresato.

Tiu pruvo per la fakto estas la plej efika por konvinki kiun ajn, kiu ne fermas obstine la okulojn antaŭ la evidenteco mem.

\*

*Le Courrier du Centre*, presata en Limoges (*Limoĝ*), enmetinte, en sia numero de l' 25:a (tago) de junio lasta, komunikon de nia fervora vastigantino, F-ino Zablon d'Her pri Esperanto, dediĉis poste du artikolojn al nia entrepreno. Ĝi tre lerte montris la praktikan flankon de tiu ĉi, je la dato de l' 28 junio, kaj elmontris la mirindan simplecon gramatikan de Esperanto, la 24:an de julio.

\*

En alia regiono de Francujo, du el niaj amikoj S-oj Sibourg, apotekisto, kaj Henriko Blanc, instruisto (en *Livron*, Drôme) faras energian kaj konstantan propagandon. Nia societo jam ŝuldas al ili kelke da bonaj aliĝoj. Ili estas en la nombro de l' komprenantaj ke entrepreno sukcesas kaj progresas proporcie kun la fervoro de ĉiuj partoprenantaj en ĝi. Kiel ni diris aliloke, vera apostolo helpas pli multe al la triumfo de afero ia, ol cent rigardantoj bonvolaj sed pasivaj. Ĉiu el ni devas rigardi kiel devon altiri al Esperanto kaj al la societo du novajn aliĝantojn almenaŭ.

\*

*Les Alpes Républicaines* ankoraŭ publikigis tri bonegajn artikolojn de s-ro Henriko Blanc sub la datoj: 10 Julio, 25 aŭgusto kaj 8 septembro.

La unua parolis pri la fremdaj lingvoj kaj Esperanto. Ĝi konkludis per tio ĉi ke nur per Esperanto oni povos facile korespondi kaj komunikiĝi kun alilanduloj.

La dua, titolita "*Esperanto kaj la skeptikuloj*", citas faktajn argumentojn kaj respondas pri kelkaj rediroj koncerne la valoron literaturan de Esperanto. Ilin ĝi refutas, sin apogante sur la flekseblecon, riĉecon kaj bonsonecon de la lingvo, kaj cetere ĝi rememorigas la tradukojn jam multajn de ĉefaj verkoj naciaj en Esperanton.

La tria distingas nian entreprenon de tiu de l' pacemuloj, sed ĝi samtempe montras kiom Esperanto povas kunlabori en la disvolviĝado de l' ideoj pri la konsento kaj la harmonio inter ĉiuj membroj de l' homaro.

\*

En la sama kategorio de pensoj, s-ro A. D. Bancel skribis artikolon sub tiu ĉi titolo "*La internacia frateco per korespondado kaj Esperanto*", artikolo kiu estis presita

la 2-an (tagon) de julio. Li tre lerte elmontris la veran rolon kaj karakteron de nia lingvo, kies tre grandan similecon kun la sudaj idiomoj de Francujo li rimarkigis.

Antaŭe li estis montrinta la profiton kiun donus Esperanto en la *Internacia korespondo inter junuloj*. Li ankaŭ estis koniginta al la legantoj de *l'Humanité Nouvelle* la naskiĝon kaj celon de *l'Esperantiste*, aldonante ke la supredirita revuo raportos pri la libroj publikigotaj en Esperanto.

\*

Nia amiko s-ro G. Thévenet presigis, dank' al la servemo de unu kolego, (en nacia lingvo) la sekvantan anoncon en sufiĉe grandan nombron da ĵurnaloj:

*Lingvo Internacia Esperanto*. — Dekses reguloj, ortografio severe fonetika, vortaro malgrandigita ĝis unu milo da radikoj, liveritaj de niaj lingvoj, kaj produktantaj vortojn senfine per sia unuigo reciproka, per la aldono de deksep gramatikaj finiĝoj aŭ la diferencigo de trideko da afiksoj precize difinitaj: tia estis la tuta konstruo de tiu idiomo, kiun oni povas konsideri kiel la okan idon de la lingvo latina.

Tre bonsona, tre fleksebla, tradukita en dekok lingvojn, Esperanto povas servi al ĉiuj internaciaj rilatoj, kia ajn estas ilia speco. Ĝi rekomendas sin per kelkaj jaroj de praktika elprovado kaj per la atesto de l' granda filologiisto Max Müller, kiu formale ĝin proklamis *supera je ĉio, kion oni ĝis nun prezentis sub la nomo de lingvo internacia*.

Por informoj sin turni al... k. c.

Ni donas en sia tuteco la tekston de tiu anonco, ĉar okaze ĝi povos servi kiel mallonga artikoleto por presigi en ian ĵurnalon.

\*


*Le Timbrophile Athénien* publikigis en la franca kaj greka lingvoj longan kaj tre lertan anoncon pri nia lingvo. Ni ĝin ŝuldas al s-ro Alberto d'Argent, 87, rue de Lorrain, Aix-la-Chapelle (Eks-la-Sapel) Garmanujo, kiu donas sian adreson por la vylantaj ricevi la broŝuron propagandan de leŭtenanto Lemaire, ni abona amiko en Belgujo.

\* \* \*

**Pri Esperanto parolis.** S-ro M. Sapojnikov skribis artikolon, presitan en n:o 206 de la gazeto *"Tuljskija Gubernskija Vjedomosti"*, pri la nuna stato kaj disvastigado de nia lingvo.

La artikolo de s-ro A. Kofman, "Esperanto kaj la rusoj", kiun publikigis *l'Espérantiste* (n:o 8—9), estas legata, svede tradukita de doktoro I. Asklöf, en n:o 125 de *Karlskrona Veckoblad*.

La gazetoj *"Le Petit Bleu"*, *"L'Etranger"*, *"O Philateliste do Occidente"*, kiuj estas en certa grado "esperantistaj", estas sendube tro bone konataj de niaj legantoj, por ke ni bezonus detale sciigi pri iliaj artikoloj esperantaj.



## El Francujo.

### La Societo por la propagando de Esperanto.

Jam de longe tiu ĉi gazeto ne donis al siaj legantoj novaĵojn el Francujo.\*) De tio ni mem estas iom kulpaj. Ni estas tiel ŝarĝegataj per la propaganda laborado, ke la tempo absolute mankis al ni por sendi al la *L. I.* aliajn sciigojn ol la kronikojn, kiujn ni presas ĉiamonate en nia gazeto *"l'Espérantiste"*. Pri tiu ĉi gazeto kaj pri nia *"Societo por la propagando de Esperanto"*, kiujn la esperantistaro eksterfranca konas ankoraŭ tro malmulte, mi volus hodiaŭ doni kelkajn sciigojn, kiuj samtempe montros niajn lastajn progresojn.

\*) Por ke niaj legantoj ne miru pri tio, ke la unua parto de tiu ĉi artikolo diras preskaŭ la samon, kiel skribis s-ro Nylén en nia septembra numero, ni volas sciigi, ke la artikolo de s-ro René Lemaire estis verkita kaj sendita de li, antaŭ ol li ricevis la nomitan numeron.

*Rimarko de la Redakcio.*

En la komenco de tiu ĉi jaro 1898, s-ro de Beaufront, fondis la gazeton "l'Espérantiste" por la propagando de Esperanto, speciale en Francujo kaj al ĉiuj personoj komprenantaj la lingvon francan. "l'Espérantiste" ne estas, kiel la "Lingvo Internacia", skribita tute kaj sole en esperanto; kontraŭe, ĉar ĝi devas taŭgi por altiri al nia lingvo personojn kiuj ankoraŭ ne konas ĝin, ĝi estas redakciata parte en lingvo franca, parte en esperanto.

Ĉiamonate s-ro de Beaufront publikigas en "l'Espérantiste" tre seriozajn fundamentajn lernaĵojn pri ĉiuj interesaj demandoj rilataj al nia lingvo, malfacilaĵoj, solvoj de objektoj, k. a. Jen estas la titoloj de la ĉefaj artikoloj ĝis nun skribitaj de s-ro de Beaufront: "Ĉu la lingvo internacia devas esti perfekta?" — "Ĉu ĝi devas esti farita por la instruituloj?" — "Latina lingvo aŭ Esperanto?" — "Kiel propagandi Esperanton?" — "Kiel d-ro Zamenhof formadis Esperanton?" — "Internacieco de Esperanto" — "La nomoj propraj en esperanto", k. a. Ĉiamonate ankaŭ, *Kroniko* analizas la artikolojn publikigitajn diversflanke por nia afero, raportas pri la publikaj paroladoj, kursoj de Esperanto faritaj de niaj amikoj — unuvorte konigas al niaj legantoj ĉion interesan, kio okazis rilate esperanton tiel en Francujo kiel en la aliaj landoj. Tiu *kroniko* estas unu el la plej gravaj partoj de nia gazeto, ĉar nenio estas pli bona kaj kuraĝiga por la Esperantistoj, ol la sciigo de la sukcesaj laboroj kiuj markas nian marŝon antaŭen. La *Kroniko* estas ĉiam skribata france *kun teksto esperanta* apude.

La fantazioj, literaturo, poezio, bibliografio havas ankaŭ lokon en "l'Espérantiste". Fine rubriko tre grava, "Frazologio", donas ĉiamonate interparoladojn en esperanto pri la aferoj de la ĉiutaga vivo, kaj estas tre utila por akiri perfektan praktikan konadon de nia lingvo.

"l'Espérantiste" estas eldonata kaj dissendata tre regule en la fino de ĉia monato.

Per tiu ĉi mallonga analizo, oni povas vidi ke "l'Espérantiste" estas efektive por ni bonega rimedo de propagando, kaj ke dank' al la "Kroniko" kaj "Frazologio", eĉ la personoj ne konantaj bone la lingvon francan povas legi ĝin interese por havi la plej lastajn novaĵojn de la propagando kaj perfektigi en la praktiko de Esperanto.

\* \* \*

Samtempe ol "l'Espérantiste" s-ro de Beaufront, kun la helpo de kelkaj amikoj, fondis la "Societon por la propagando de Esperanto". La gazeto "l'Espérantiste", kvankam sendependa, servas kiel organo de la Societo, kaj publikigas ĉiamonate la nomaron de la novaj societanoj kaj la diversajn komunikojn de la Societo.

La Societo estas tiamaniere organizita ke ĉiu persono favora al nia afero povas eniri ĝin. Estas tri kategorioj de membroj: *aprobantoj*, *adeptoj*, *propagandantoj*. En la kategorio "aprobantoj" estas la personoj, kiuj ne volas aŭ ne povas pro manko de tempo aŭ alia kaŭzo lerni Esperanton, sed tamen estas favoraj al nia entrepreno, volas koni ĝiajn progresojn kaj helpi ĝin per ia monofero. En la kategorio "adeptoj" estas la veraj esperantistoj, kiuj donis la pruvon ke ili jam konas iom nian lingvon. Fine en la kategorio "propagandantoj" estas la varmaj amikoj kiuj altiris al la Societo 5 adeptojn aŭ 10 aprobantojn.

Oni vidas ke tiamaniere ni povas akcepti ĉiun bonvolon kiu deziras alporti al ni sian helpon.

La Societo estas administrata de komitato formita de la sekvantaj personoj: L. de Beaufront, prezidanto; Hamel, vic-prezidanto; Lemaire, sekretario-kasisto; Bel, Blanjean, Démarest kaj Roux.

La Regularo de la Societo estas sendata al ĉiu persono kiu petas pri ĝi.

\* \* \*

Per tio la legantoj vidas ke ni ne ripozas en Francujo kaj ke ni organizadis energiajn rimedojn de propagando. La rezultatoj estis jam gravaj kaj estos ĉiam pli bonaj. Ni gajnis en la tuta Francujo multajn novajn amikojn, kiuj nun laboras kun ni senlace por la sukceso de nia afero. Kursoj publikaj oficialaj ekzistas jam en Bruselo kaj Grenoble (Grönobl). En aliaj urboj, Montpellier (Mônpeŭje), Lyon (Ljôn), Limoges (Limoj), k. a., niaj amikoj s-roj Roux kaj Bel, s-rino Zabilon d'Her faris publikajn paroladojn. Dank' al ili kaj ankaŭ aliaj, s-roj Démarest, Daudé, Canet, Pellerat, Blanc, Sibourg k. a., gazetoj tre multaj parolis favore pri ni. Nomi ilin estus neeble aŭ almenaŭ tro longe. Oni sciu nur, ke precipe la gazetoj kaj revuoj por instruistoj, la revuoj stenografiaj, pacaj, internaciaj, ricevis laŭde nian lingvon kaj helpas nin en la propagando.

Ĉio tio (kio estas nur la tre rapida analizo de la ĉiamonataj kronikoj de "l'Espérantiste") montras kiel gravan movadon nia Societo ekdonis al nia afero, speciale en Francujo kaj Belgujo, ankaŭ en aliaj landoj, ekz. en Brazilujo.

Dum la venonta jaro 1899, kiu estos la dua de ĝia ekzistado, la Societo por la propagando de Esperanto laborados pli energie ol iam por disvastiĝi kaj altiri al si novajn membrojn. Ĝi bezonas ĉiam plifortiĝi kaj fariĝi sufiĉe riĉa, por ke ĝi povu plenumi unu el niaj plej karaj deziroj: belan ekspozicion de Esperanto ĉe la Granda Ekspozicio Universala de 1900 en Parizo. Tiu ĉi gravega entrepreno, kiu povas tiel multe utili al Esperanto, estas de nun la ĉefa celo, al kiu nia Societo aldonos sian laboron kaj monon. Sed la entrepreno estas plena je malfacilaĵoj, ĝi kostos tre multe da mono. Tial ni pensis, ke en tiu okazo pli necese ol iam estis fari varman alvokon al ĉiuj esperantistoj, kaj komprenigi al ili kiel multe ilia aliĝo al nia societo povos utili por nia Ekspozicio de 1900, kies sukceso estos sekceso komuna de la tuta esperantistaro. La okazo estos bela por montri nin: estus granda domaĝo, se pro manko de rimedoj ni ne povus el ĝi profiti!

\* \* \*

La legantoj povis jam vidi en la anoncoj de la *L. I.* la kondiĉojn por aboni nian gazeton aŭ eniri nian Societon. Ĉar la diferenco inter la simpla abono kaj la societa kotizaĵo estas tre malgranda (sole 50 centimoj), tial ni konsilas al niaj amikoj ke ili prefere konsentu fariĝi membroj de la Societo. La jara elspezo estas 4 frankoj, aŭ 1 rublo 50 kop., kiujn oni povas sendi per bankaj biletoj, poŝtaj mandatoj aŭ neuzitaj poŝtmarkoj.


Inter la esperantistoj, kiuj jam estas membroj de nia Societo, ni nomos: en Rusujo, s-rojn Zamenhof (honora membro), Gernet, Kofman, Laskin, Soloviev, Borovko, Zinoviev, Blomberg, Grünfeld, de Majnov, — en Svedujo, s-rojn Langlet, v. Sydow, Asklöf, Mellander, Bäckström, — en Brazilujo, s-rojn Baggi de Araujo, Guimaraes Natal, de Azeredo Coutinho, Mathias da Gama, — en aliaj landoj s-rojn Trompeter, da Costa e Almeida, da Cruz Capello, Marignoni, Geoghegan, kaj tre multajn el niaj esperantistoj de Francujo kaj Belgujo.

Mi esperas ke tiu ĉi artikolo, konigante plibone nian aferon al niaj eksterfrancaj amikoj, altiros al nia Societo multajn novajn aliĝojn. Ĉar ĝi laboras eĉ por la tuta esperantistaro, ĉu ne estas juste ke ankaŭ de la tuta esperantistaro ĝi petu helpon?

Al ĉiu persono kiu sin turnos al mi, mi sendos numeron-modelon de "*l'Espérantiste*" kun la regularo de la Societo. Mi donas ankaŭ ĉiujn sciigojn kaj klarigojn dezireblajn. Oni nur estas petata aldoni al sia letero neuzitan poŝtmarkon por la respondo kaj la sendo de la gazeto.

**René Lemaire,**

sekretario de la Societo por la propagando de Esperanto, en *Epernay* (Marne).



## Kelkaj vortoj pri la artikolo: "Kiel faciligi ellernadon de nia lingvo?"

(Vidu N:o 10 de "L. I.")


En la nomita artikolo s-ro Rakitski tuŝis tre gravan demandon pri la bonaj lerniloj por faciligi la konatiĝon kun nia lingvo. Konsentante entute kun liaj ideoj, mi ne povas tamen lasi sen rediro unu punkton, koncerne lian libron por komenca legado, des pli, ke li nomas min, kiel ne aprobintan lian libron, kaj sendas al mi la riproĉon, ke mi ne diferencas "ordinaran legadon kaj lernan komencan legadon".

Kiel s-ro Rakitski, mi pensas, ke ni bezonas bonan libron por komenca legado, sed mi absolute rifuzas kompreni, kial la enhavo de tia libro devas esti neinteresa kaj por ĉiuj konata. Eĉepte la profundan filozofion kaj metafizikon, mi ne scias ion, kio ne povas esti esprimita en gramatike simpla kaj klara lingvo, kaj la bezono, ke la lernanto sciu la komunan enhavon de tio, kion li legas, tute ne ŝajnas al mi tiel grava, granda kaj premanta. Oni povas elekti por tiu ĉi libro interesan materialon el historio, sciencoj kaj literaturo, sed oni devas tre zorge kaj tre konsekvence prilabori tiun ĉi materialon laŭ la formo, metante en la komenco de la libro la simplan parolon kun malmultaj formitaj per sufiksoj kaj prefeksoj vortoj, sed kun multaj vortoj vere internaciaj, kaj iom post iom konatigante la leganton kun esperanta vortformado, kun esperanta meza stilo, kun la uzado de l' verbaj formoj, kun la universaleco de niaj sufiksoj k. t. p. Oni devas zorgi pri la uzado de l' vortoj, similaj al *ree, ema, eco, dise*, nur tiam, kiam la leganto jam bone scias el la antaŭa materialo la veran sencon de tiuj ĉi radikoj, kaj kun ili li devas konatiĝi antaŭ ĉio laŭ tiuj internaciaj vortoj, kies parton ili faras, por ke ilia signifo mem restu en lia kapo. Tial mi uzus komence la formojn *resoni, rejeti, remeti, repasi* k. t. p. kaj poste per la formoj, similaj al *ree, reigi*, konatigus kun la universaleco de la uzado de tiu ĉi vorto. Tiamaniere la leganto konsekvence kutimiĝus al la vortoformado, kaj la legado fariĝus por li facila. Similan konsekvoncon oni devas elteni en ĉiuj partoj de la gramatiko kaj sintakso. Eble oni ne povas konservi tian severan konsekvencon, sed oni devas celi al ĝi, kaj ju pli oni proksimiĝos al ĝi, des pli facila kaj utila estos la libro por komencanta esperantisto. Sed la enhavo de la libro devas esti interesa, alie ĉiuj ruzaĵoj de la aŭtoro ne kondukos al la celo, ĉar se la



libro estos enua por la lernanto, li simple ĵetos ĝin kun la tuta ĝia konsekvenco kaj preferos aŭ forlasi la lingvon aŭ serĉi aliajn rimedojn ellerni ĝin. Aforismoj, anekdotoj, historio, popularaj sciencaj artikoloj, priskriboj de vojaĝo — ĉu tio ĉi ne donos pli konvenan materialon, ol la fabletoj kaj fabeletoj pri fiŝisto kaj fiŝeto, ĝardenisto kaj filoj, hundo kaj lupoj k. t. s.? Kiam niaj infanoj lernos lingvon internacian, tiam similaj rakontetoj plenumos sian rolon, sed nun ili estas, laŭ mia sincera konvinko, nekonvena materialo por komenca legado. La enhavo de niaj lernejoj lernolibroj de l' fremdaj lingvoj (mi parolas pri tiuj, kiuj estas uzataj en la rusaj lernejoj) tute ne povas esti modelo, ĉar ĝi estas kapabla furiozigi eĉ la modestan lernanton danke al sia malriĉeco de l' enhavo kaj pensoj, kaj jam antaŭlonge en la literaturo pedagogia aperas de tempo al tempo protestoj kontraŭ tiuj ĉi interesaj sciigoj, ke "mia libro estas sur la tablo", "libro de Teodoro ankaŭ estas sur la tablo" kaj "la libro de la fratino kuŝas sur fenestro", per kiuj estas plenigitaj preskaŭ ĉiuj lernolibroj. Ankaŭ la fabletoj kaj fabeletoj, kiujn al ni rakontadis patrino aŭ vartistino, kiam ni ne sciis legi, kiujn ni legis en nia nacia libro, lernante legi, kaj dek fojojn relegis en la franca, germana, angla, latina lernilo, kiujn ni rakontis al niaj malgrandaj gefratoj, kaj poste al niaj infanoj — ili sendube jam perdis por ni intereson, kaj oni bezonas sufiĉan provizon da presistemeco kaj kuraĝo, por en la aĝo matura ankoraŭ unu fojon relegi atente ĉiun tiun ĉi trezorejon de l' infana spirita mondo.

V. Gernet.



## Fantazio.

Mi tralegis en N:o 6—7 de "Lingvo Internacia" la proponon de s-ro F. Postnikov al esperantistoj, dezirantaj viziti Parizan tutmondan Ekspozicion de 1900 jaro; li proponas fari tiun-ĉi vojaĝon kune kun li.

Mi estas granda fantaziulo kaj traleginte tiun-ĉi proponon, mi tuj prezentis al mi la tutan pentraĵon... Jen — sur ia loko de Ekspocio, ne tre malproksime de ĝia centro, staras tre bela, malgranda, tre originala konstruaĵo en formo de pavilono; super gracia kupolforma tegmento de tiu-ĉi pavilono estas alfortikigita per konsoloj, havantaj la formon de ankroj — simboloj de espero, — la modelo de terglobo, ĉirkaŭzonita per rubando kun ora surskribo "*lingvo internacia Esperanto*"; super la terglobo staras bastono kun ora kvinpinta stelo sur ĝia supraĵo.

Tiu-ĉi konstruaĵo estas speciale esperanta pavilono... En ĝi oni vendas la ekspoziciajn konduklibrojn, skribitajn en Esperanto; en ĝi oni vendas la esperantajn signetojn en formo de kvinpintaj steloj kun ankro en la mezo... en ĝi oni vendas la esperantajn lernolibrojn por plej diversaj nacioj — angloj, germanoj, bulgarioj, francoj, svedoj, italoj, rusoj, poloj, danoj, portugaloj...; en ĝi ĉiu esperantano, vizitanta la ekspozicion, enskribas en apartan libron sian nomon, sian adreson kaj la tempon, dum kiu li restos en Parizo...

Multe da homoj ĉiam vizitadas tiun-ĉi interesan anguleton de Ekspozicio por vidi kaj aŭdi per propraj okuloj kaj oreloj, kiel la homoj, apartenantaj laŭ ekstera vido al plej diversaj nacioj, parolas inter si en arte kreita lingvo, kiun ili nomas Esperanto, kaj kiu okulvideble disbatas "la obstinajn barojn inter la popoloj dividitaj..."

Sinjoroj esperantanoj! se tiu-ĉi fantazio estas bona kaj dezirinda, oni devas peni ĝin efektiviĝi. Sed oni povas ĝin efektiviĝi nur per niaj *komunaj* fortoj. Tamen, por ne perdi vane la energion kaj tempon, oni devas antaŭe ekscii niajn fortojn; tial ĉiu esperantano, aprobanta la ideon kaj deziranta helpi al ĝia efektiviĝo, volu tuj skribi en la redakcion de "Lingvo Internacia" la sekvantajn liniojn: "Mi, subskribinta, kunsentas la ideon de Ikso en N:o 11 de "L. I." kaj promesas donadi por ĝia efektiviĝo dum la tuta jaro 1899 la  $\frac{1}{200}$  de mia salajro aŭ profito; la monon mi sendos en du tempoj: unuan duonon de la tuta sumo al 1:a Julio de 1899; la duan duonon al 1:a Januaro de 1900. Subskribo."


Ŝajnas al mi ke  $\frac{1}{200}$  de salajro aŭ profito dum unu jaro ne estos aparte malfacila ofero...

Mi mem tion-ĉi promesas kaj sendos en la redakcion de "Lingvo Internacia" al 1:a Julio de 1899 jaro 19 frankojn kaj tiom-do al 1:a Januaro de 1900.

Povas esti, kaj ni esperos, ke iu el niaj amikoj, scianta la arhitektan arton, ne rifuzos fari la desegnon de esperanta pavilono por Pariza tutmonda Ekspozicio... Povas ankaŭ esti, ke iu el niaj francaj amikoj, loĝantaj en Parizo, ne refuzos preni sur sin la zorgon pri aranĝado de la afero sur la loko mem, la klopodojn antaŭ la Ekspozicia administra komitato kaj t. s. . .

**Ikso.**

P. S. Mian efektivan nomon mi sciigis en la redakcion de "L. I."



### Tri malliberuloj.

(Laŭ temo el malgrandrusa popola poezio).

En urbeto Borispolo,

En malliberdomo \*)

Sidis iam tri kozakoj,

Do ĉiu — junhomo.

Unu sidas pro knabino

Kaj ne malĝojadas, \*)

Ĉiam ludas kaj fajfilas

Kaj kantojn kantadas;

Dua sidas pro vidvino,

Plej bela en mondo,

Blankvizaĝa, nigrokula,

Kun haroj malblondaj;

Tria sidas pro edzino

Alia de homo,

Pro flirtema, pro nezorga

Je edzo kaj domo.

Kaj unua gaje diras:

Mi timon ne vidas —

Kun knabino mi edziĝos,

Pro kiu mi sidas...

Dua diras malĝagrene:

Min kio timigos?

Kun vidvino per donacoj

Mi ĉion ordigos.

Tria diras malespere:

Mi timas, ho fratoj,

Ke por ĉiam mi restados

Post tiuj ĉi kradoj.

Min nenio liberigos


El tiu ĉi spaco:

Nek edziĝo dezirata,

Nek kosta donaco.

**I. Lojko.**

\*) Ritmo: — — — — —.



## Fonetike aŭ Ortografie?

“L’ ekstremoj sin tuŝas“ diras la francoj kaj ili estas pravaj, milfoje pravaj; sed mi aldiras: “l’ ekstremoj ĉiam eraras“, ĉar la homoj, kies intelekto ne enhavas econ trovi la “oran mezon“ ne estas kapablaj doni veran solvon de la demandoj pri kiuj ili disputas.

Ni volu esplori, kial do la anoj de du tendaroj, la purefonetika kaj la pureortografia (kun la sinjoroj N. Borovko kaj V. Gernet en la kapo), neniel estas pravaj, kaj ni rememoru, kion ili diras kaj defendas.

S-ro Gernet\*), tre lerte jonglante kun vortoj, anstataŭigas la demandon “kiel skribi la nomojn proprajn“ per la frazo: “kia maniero de skribado donos la eblon evitadi nekomprenajojn kaj ĉiam precize noti la objekton, pri kiu oni parolas?“ kaj jonglante plue kun la esprimo *barbarigi* kaj kun tuta vico de nomoj propraj oportune elparoleblaj, preskaŭ neelparoleblaj kaj eĉ malparoleblaj de la gorĝo de moderna eŭropano, tute senatende venas al la decido, ke “laŭ la esenco de lingvo internacia ni devas pli ofte legi nomojn ol elparoli ilin“, ĉar li diras: “la leteraj komunikigoj estas pli oftaj ol buŝaj.“ Tial li volonte kaj kun trankvila koro rifuzas al si mem (kaj al ĉiuj ankaŭ) la eblon elparoladi nomojn proprajn kaj preferas skribi ilin ortografie.

Bedaŭrinda amiko! Nunan infanan staton de la lingvo internacia opinante kiel ĝia esenca eco, li batas sin mem per la ŝtonoj: volante ĉiam precize noti la objekton li proponas *neelparoleblan skribmanieron, konveneblan nur por letera komunikigo*.

Jezo diris al ni: “Ne donu ŝtonon al la malsata kaj ne donu acidumon al la soifanta“, kial do s-ro G., tiu vera kaj pasia amiko de Esperanto, povis tiel barbarigi la ĉefan penson de la genia produkto de L. Zamenhof kaj malestimu la paragrafon 16-an de la gramatiko de lia lingvo?

Ĉu li vere pensas, ke l’ aŭtoro de la lingvo Esperanto donacante al la mondo Lingvon Internacian povis allasi la penson, ke liaj disciploj ne ekdeziros havi iom pli da homaj ecoj (rajtoj) ol havas surdamutaj malferuloj?!

Mi komprenas, ke sovaĝulo neniam sin kombinta trovas la kombadon neoportuna kaj la kombilon malutila, mi allasas, ke okcidenteŭropano, dum centjaroj kutimiĝinta je skribformo ortografia, l’ alvokon preni la fonetikan rifuzas kiel senutila kaj ridinda. Sed, glor’ al Dio, en Eŭropo jam taĝiĝas: en Anglujo, en Germanujo kaj eĉ en Franĉujo aperis societoj, kies la celo estas propagandi la fonetikismon. S-ro V. Gernet ne povis tion-ĉi ne sci kaj lia artikolo en n:o 4 de la “L. I.“ de p. j. sonoras kiel malagorda dissonanco kun la ĉefa ideo de la L. I. Mi povas lin pravigi nur kiel gentilulon ne dezirintan ofendi niajn francajn amikojn, kiuj kun ŝaŭmo sur la lipoj defendadas modernan ortografion de propranomoj, ofte forgesante ke iliaj propaj nomoj eble antaŭ kelkaj centjaroj ortografiĝis tute alie. Sendisputa estas la rajto de ĉiu homo defendi ĝis la perdo de lasta sangguto sian proprajn, sed al neniu apartenas la rajto agi kaj agigi kontraŭ la bonestado de aliaj kaj progreso de l’ homa civilizacio.

Ankaŭ mi ne povas konsenti kun s-ro Borovko, kiu diras, ke la nomoj skribitaj laŭ ortografio internacie nekonata estas mortaj. Mi konfesas, ke

\*) Vidu N:o 4 de “L. I.“ 1897.

laŭ rusaj leĝoj l' intenco kaj eĉ antaŭprepariĝo iun mortigi ne estas puninda, tamen mi ne pensas ke li restas antaŭ okuloj de alilandanoj praviginda pro lia, eble senvola, intenco montri iliajn nomojn antaŭ tuta mondo kiel mortaj. Ne! ili vivas kaj vivos ĝis ilia lasta signeto pereos; tamen, mi esperas, neniu disputos, kaj eĉ s-ro Gernet tion-ĉi jesigas, ke *ili vivas antaŭ niaj okuloj mutaj kaj surdaj*.

S-ro B. donis akran ilon por la moko uzinte malprosperan vorton "barbarigi". Ni jam havas la vorton esperantigi; sed laŭ mi, ankoraŭ pli konvena estas la esprimo "internaciigi" t. e. konformigi al la lingvo internacia kaj al internacia uzado.

Tial, por paciĝi du ekstretoj kaj veni al praktika solvo de la demando, ni volu trovi oran mezon kaj laŭ ekzemplo de s-ro Arnold mi proponas la tezojn:

1. La nomoj propraj, kies elparolado estas konata konforme la § 16 de la gramatiko de L. Zamenhof prenas la ortografion fonetikan kun literoj de l' alfabeto de la L. I. — Almenaŭ unufoje en ĉiu aparta artikolo aŭ ĉapitro oni volu doni (se nur oni ĝin scias) en krampoj kun literoj italaj (*kursivaj*) ilian originalan skribformon.

Ekzemploj: Siller (*Schiller*), Bajron (*Byron*), Ŝekspir (*Shakespeare*).

Rimarko 1. La finsonon o oni devas almeti nur en okazoj, kiam ĝia foresto kaŭzas ŝanĝon de natura akcento.

Ekz.: Berlino, Parizo, Peterburgo.

Rimarko 2. La akcento neregula devas esti ĉiam markata.

Ekz.: Figarò, Soròkino.


2. La nomoj propraj, kies fonetika skribformo kun literoj de l' alfabeto de la L. I. ne povas esti preciza, prenas la ortografion originalan, sed nepre kun literoj *italaj* de latina alfabeto. Se ilia elparolado estas konata, oni volu doni, almenaŭ unufoje en ĉiu aparta artikolo aŭ ĉapitro, ilian precizetan fonetikan skribformon kun literoj de la L. I.

Rimarko. Ĉiu vorto aŭ esprimo skribita laŭ ortografio originala t. e. ne-internacia, devas esti presata per literoj *italaj*, kiuj en skribaĵo oni signas per substreko.

Tiel mi kuraĝas proponi: ne rompante la § 16-an de la gramatiko de la lingvo, kiun al ni donis L. Zamenhof, alpreni ĉi-tiun dualismon de skribformoj de la nomoj propraj, kiu devas havi la saman signifon, kiel *septakordo* en la muziko, kiu ebligas la moduladon de unu tonaro al alia dum senĉese sonanta ĉeftono de la septakordo fariĝas enfine reganto de nova tonaro.

Tomsk, oktobro 1898.

V. Shmurlo.



## "La sovaĝa popolo Esperanta."

Mi havas unu bonan amikon, kun kiu mi ofte kaj multe disputadis pri Esperanto. Li estas iom skeptika kontraŭ nia ideo kaj nia lingvo, sed kelkfoje li disputas sole pro la amuziĝo, kiun donas viva argumentado por kaj kontraŭ la tezoj.

Unufoje, kiam li estis en sia mokanta humoro, lia fantazio forportis lin al la malproksima angulo de la mondo, kie loĝas la "sovaĝa popolo Esperanta", kiel li ĝin nomis. En tiu lando, "Esperantujo", vivus feliĉa gento da homoj

en plena interkompreniĝo — kaj li pentradis per la plej brilaj koloroj ilian vivadon, feliĉigata per Esperanto.

Mi pensis, ke mia ŝercanta amiko estas sola pri tiu ĉi fantazio. Sed ne!

Ni skribis sur la paĝo 87 de nia gazeto pri unu artikolo de s-ro Fred Isly. En la 28:a numero de "*le Pêle-Mêle*", la 10:an de julio, li dediĉis de-nove sufiĉe longan artikolon al Esperanto.

Li elvolvas en ĝi kun serioza mieno ideojn similajn al tiuj de mia amiko.

Antaŭ ĉio li konsideras kiel fundamentan veron, ke nur arta lingvo povas pretendi la rolon de lingvo internacia. Poste li diras:

"Sed mi opiniis kaj ankoraŭ opinias, ke lingvo internacia ne povas ekzisti sen lando internacia, eĉ kiom ajn malgranda.

La lingvoj ne estas nur kolekto da vortoj, kies uzadon difinas reguloj gramatikaj. Ĉia lingvo pruntis, por la konformeco fizika kaj morala de sia lando, tre rimarkeblajn apartecojn, ĉia havas, per unu vorto, *sian spiriton*."

Esperanto devas do havi sian spiriton, ĉar "se ĝi ne havas patrujon, ĝi pruntos en ĉia lando sian spiriton el la lingvo nacia de tiu lando, tiel ke ĝi havos post tre malmulte da tempo tiom da diversaj elvidoj, kiom estas la landoj." Kaj plu: "Sekve la grava punkto estas trovi la pecon da lando, kiu fariĝos la hejmo, la patrujo de la lingvo internacia. Kiam tio ĉi fariĝis, tiam la cetero postulos sole iom da laboro kaj bona volo."

Mi ne parolos pri tiu landeto internacia, la hejmo de Esperanto, kiun volas s-ro Fred Isly. Ĝian bezonecon mi tute ne kredas. Sed mi kredas pri vivanta lingvo sen propra teritorio.

Mia patra lingvo, la sveda, estas efektive *du* lingvoj, la ordinara parola lingvo kaj la literatura lingvo. Ili estas du fratinoj, kiuj havas multajn similajn trajtojn, sed ili estas malsimilaj en multaj koncernoj. Ni verkas en la literatura lingvo, ni legas en ĝi kaj ni paroladas publike pri sublima temo en tiu ĉi lingvo; sed en la ĉiutaga vivo ni ne parolas ĝin; se unu persono penus ĝin paroli en siaj ordinaraĵ kondiĉoj, li farus sin ridinda tiel same, kiel li farus, se li irus en la stratojn per iriloj. Por la ĉiutaga krompeniĝo ni uzas idiomon, kies provizo de vortoj, gramatikaj formoj kaj sintaksa aranĝo de la vortoj kaj vortgrupoj ne estas tute la samaj ol tiuj de la literatura lingvo. Tiu ĉi lasta lingvo, kiu aperas kaj elvolviĝas en la gazetaro, en la literaturaĵ verkoj kaj oficialaj skriboj, elvolviĝas parte en manieroj, kiuj diferencigas al la elvolviĝo de la parolata idiom.

La sveduja literatura lingvo estas, tiel diri, la "internacia" lingvo de ĉiuj partoj de la lando, sed oni ne povas montri lokon, urbon aŭ provincon, kie ĝi estas ĉiam parolata. Ĝi ludas en nia patrujo tian saman rolon, kiun Esperanto celas en la tuta mondo civilizita.

Neniu povus neigi, ke nia literatura lingvo havas sian spiriton, neniun ankaŭ povas, kun ia ŝajno de vero, pruvi ke la lingvo internacia Esperanto ne havas sian propran spiriton, kiel la unu kaj sola Esperanto, kaj ne sole kiel la Esperanto de tiu ruso aŭ de tiu ĉi franco aŭ svedo.

La komprenaĵoj, la ideoj estas la samaj en la tuta mondo, nur la formo de ilia esprimado estas diversa. Ĉar la homa prudento estas unu sama, kaj la homo povas pensi logike kaj vere nur laŭ unu sola maniero. La vortoj estas figuroj, la lingvo estas materialo por esprimi la ideojn, la pensojn en tempo kaj spaco. La ideo naskas vivon en la vorto, la diro vivas per la penso.

Unu certa ŝtofo, materialo, korpo povas vivi nur per unu certa spirito. La korpo kaj la spirito efikas reciproke unu je la alia, la spirito donas al la


korpo ĝian specialan manieron de ekzistado, kaj la korpo, formita kaj laboranta laŭ certaj principoj, donas al la spirito ĝian limigatan agadon. Se tiuj ĉi miaj diroj estas veraj, ĉiu persono, uzanta la lingvon Esperanto laŭ ĝiaj gramatikaj reguloj kaj internaj kapablecoj, nepre skribas kaj parolas ĝin tiel same. Tio ĉi estas ankaŭ la vera fakto, pruvita per la praktiko de deko da jaroj en la tuta mondo.

Mallertaj personoj povas uzi erare la regulojn kaj neinstruitaj homoj iafoje vestas siajn pensojn per la pentritaj vestoj de sia lingvo anstataŭ prezenti la pensojn korekte en ilia logika nudeco. Tio ne estas kulpo de Esperanto. Ĉia nacia lingvo havas siajn pentraĵojn, siajn idiotismojn, kiujn oni devas lerni studiante la nacian lingvon. En Esperanto oni evitas ilin, oni uzas tiajn vortojn, kiuj nomas la konforman ideon.

Ne estas bezona transmigrigi al "Esperantujo" por kompreniĝi per Esperanto, nek por konstati la unuecan spiriton de la lingvo internacia.

Skribu ĝin kaj parolu ĝin, kaj la spirito de tiu ĉi lingvo vin regados, eĉ malgraŭ vi mem!

Paul Nylén.



### De niaj abonantoj.

Al la redakcio de la gazeto "Lingvo Internacia".


*Multestimata redaktoro!*

Mi petas doni lokon al tiu ĉi letero en Via estiminda gazeto. En nia urbo enhavanta ĉirkaŭe 62 milojn da loĝantoj oni ne aŭdis pri la lingvo "Esperanto" ĝis la pasinta jaro. Mi estis la unua, kiu, ellerninte tiun ĉi lingvon, komencis propagandi ĝin tie ĉi. Aĉetante lernolibrojn mi ilin disdonadis ĉie, kie mi nur povis. En la tempo de unu jaro mi vendis kaj disdonis pli ol 150 lernolibrojn de N:oj 72 kaj 77 kaj ĉirkaŭe 200 broŝuretojn de N:o 82, kiujn mi dissendadis en ĉiujn legejojn kaj lernejojn senpage.

En la fenestroj de lokaj magazenoj ĉiam pendas n:oj de la gazetoj "L. I." kaj "L'Espérantiste", broŝuroj de la "Biblioteko", leteroj, de diversaj nacioj, skribitaj en Esperanto. Per unu vorto, mi kun ĉiuj miaj fortoj penas konatigi la Elisavetgradan publikon kun nia kara lingvo. Sed mi devas konfesi ke tia laboro estas iom malfacila por mi. Tial mi tre petas la afablan redakcion, por plifaciligi mian laboron, oferi unu ekz. de la gazeto "L. I." je la 1899 j. por la loka biblioteko de l' societo "Opora" (Apogo). La biblioteko estas vizitata de multaj kleraj homoj, kaj mi estis certigita, ke tio ĉi fruktoportas. La adreso de l' Biblioteko estas: Elisavetgrad, Biblioteka obŝĉestva "Opora". Mi ankaŭ petas la komitatojn de l' societo "Espero" en Peterburgo kaj Odessa kaj la klubon en Uppsala, doni al mi subtenon per lernolibroj kaj propagandaj broŝuroj. La enspezitan monon mi kun granda danko resendos. Mi estos kore dankanta al la aŭtoroj kaj tradukistoj, kiuj sendos al mi kelke da ekzempleroj de ilia verkaĵo, kaj entute al ĉiu esperantisto kiu helpos al mi en mia afero de propagando nian karan, belan lingvon "Esperanto". La nomoj de l'oferintoj estos presataj en la gazeto.

Kun respekto **Greguar Slucki.**

Agento de la lingvo Esperanto en Elisavetgrad.




## Admonoj ĵurnalistaj.

La sekvantaj konsiloj, donitaj de Amerika gazeto, eble estas rekomendindaj ankaŭ al esperantistoj.

1. Kion ajn vi volas informi al gazeto, faru plej baldaŭ kaj enliveru ĝin tuj, ĉar tio, kio estas nova, kiam vi ĝin pensas, eble ne estos nova post unu horo.
2. Esprimu *mallonge!* Per tio vi ŝparas la tempon de la leganto kaj de vi mem. Via tezo fundamenta estu: *faktoj* — neniam frazoj, neniam analizadoj!
3. Estu klara, skribu *legeble*, precipe *nomojn* kaj *ciferojn*.
4. Ne skribu "hieraŭ" kaj "hodiaŭ", sed la tagon kaj daton.
5. Metu pli da punktoj ol komoj, sed forgesu neniujn el ambaŭ.
6. Neniam korektadu nomon aŭ ciferon; trastroku la vorton nekorektan kaj reskribu ĝin korektan super aŭ apud la alian.
7. La plej grava: neniam, neniam, *neniam* skribu sur ambaŭ flankoj de la papero. Cent linioj, skribitaj sur unu flanko, facile povas esti distranĉitaj kaj disdonitaj inter la tipografistoj; skribitaj sur ambaŭ flankoj, ili postulas pli multe da tempo de la tipografistoj; pro tio ofte okazas, ke artikolo ne povas esti presita en la sama tago kiam estas liverita, sed devas esti prokrastita ĝis la sekvanta kaj tiam plej ofte estas perdinta sian indon.
8. Kion ajn vi skribas, prefere subskribu vian nomon. Sciigu ĉiam vian adreson, kaj estu trankvila ke la nomo de la skribinto, se li tion deziras, restos sekretigata.
9. Ĉiam tralegu ankoraŭ unufojon tion, kion vi skribis, antaŭ ol vi ĝin transsendas; se vi mem ne kontentas je ĝi, ĵetu ĝin en la paperokorbon.
10. Ĉiam metu sufiĉe da poŝtaj signoj sur viaj leteroj.

P. Ahlberg.




## El Lermontov.

### Preĝo.

Mi dankas Vin, mi dankas Vin por ĉio,	Por animfajro en dezert' perdita,
por turmentita per pasioj kor',	por ĉio, ĉio kio trompis min . . .
por venĝo, por d' amikoj kolumnio,	Nur faru tiel Vi ke, devigita
por la venen' de kis', por varma plor'!	mi jam ne estu longe danki Vin!

S. Sviridov.



## Smolensk.

### Priskribo de A. Z.

Smolensk estas unu el la plej antikvaj urboj de Rusujo. La nomon sian ĝi ricevis de la rusa vorto "smola" (rezino), kiun iam oni multe faradis en la ĉirkaŭaj arbaroj. Smolensk kuŝas sur la ambaŭ bordoj de la rivero *Dniepr*.

La urbon ĉirkaŭas ŝtonaj muroj, kiuj estis konstruitaj en la reĝado de Boris Godunov. Ĝi havas tri publikajn ĝardenojn: 1) "*Ermitaĵo*", 2) "*Lopatinskij sad*" kaj 3) "*Blonje*". La plej bela estas la ĝardeno *Blonje*. En tiu ĉi ĝardeno estas oranĝerio, kaj monumento de la glora rusa komponistaro *Glinka*.

Ĉirkaŭ la ĝardeno *Lopatinskij* sur la placo-parada sin trovas tre bela granita monumento je la memoro de l' jaro 1812.

\*) Por tiu ĉi verseto ekzistas la kantmuziko, verkita de Varlaamov, kia plene agordas kun la teksto Esperanta. Ĉu iu esperantisto interesiĝus je tiu romano?

Bela vido eletendas sin je la urbo de la turo *Veseluhia* (unu el la turoj de la ŝtonaj muroj), de kiu alteco la tuta urbo kun siaj ĉirkaŭaĵoj estas kiel sur la manplato.

Bele sin disjetis Smolensk sur kvar montetoj (Pokrovskaja, Kazanskaja, Kozlovskaja kaj Voznesenskaja montoj), ĉirkaŭe de la antikva ortodoksa katedra preĝejo.

La urbo enhavas 36,800 da loĝantoj. En Smolensk estas klasika vira gimnazio, reala lernejo, unu virina gimnazio kaj progimnazio, kaj unu metia lernejo; krom tio estas multaj aliaj komencaj lernejoj.

Sed la plej bela el la konstruaĵoj estas katolika preĝejo, konstruita je la gotika stilo, danke al la penoj de l' pastro kanoniko Stefano Deniseviĉ.

### Carl Schafft en Ratzeburg,

Deutschland (Germanujo),

serĉas ŝanĝi koloraj markoj oficaj de urbsigeloj (markoj de leterfermo) kun kolektistoj eksterlandaj.

### Al atento de la rusaj esperantistoj.

Per Esperanto.

Nova, perfekta, simpligita, tre facile ellernata metodo de Rusa Stenografio de J. A. Ĵivotovski en kvin literaj lecionoj. La kondiĉojn kaj prospekton oni elsendas senpage.

Odessa, Maly per. N:o 1.

Al J. A. Ĵivotovski.

Danke al Esperanto.

### L'Étranger, Organe de la société d'études internationales

eliradas ĉiumonate per granda n:o, kiu ĉiam enhavas tekston esperantan kun franca traduko. Kostas en tuta mondo 8 frankojn ĉiujare. Abonanto de tiu ĉi gazeto ankaŭ havas la rajton fariĝi membro de la societo "Correspondance Internationale" (I. C.), kiu kalkulas ĝis nun ĉirkaŭe 300 membrojn.

Adreso: L'Étranger: 77, rue Denfert-Rochereau, Paris.

## L'Espérantiste

monata gazeto

publikigata en la franca kaj esperanta lingvoj

havas la celon propagandi Esperanton en la landoj uzantaj la lingvon francan kaj entute apud ĉiuj komprenantaj tiun ĉi lingvon. Per tekstoj kaj konsiloj specialaj, ĝi potence helpadas al la adeptoj pri la perfekta akiro de Esperanto.

Por ricevi *L'Espérantiste* oni povas: aŭ simple aboni ĝin (3 fr. en Francujo; 3 fr. 50 en la aliaj landoj) — aŭ fariĝi membro de la Societo por la propagando de Esperanto (4 fr. por jara enpago).

Sin turni al S-ro René Lemaire, sekretario de l' societo, en Epernay (Marne), Francujo.

Speciala instruado

de

## Librotenado

kaj komercaj kalkuloj

per korespondado en lingvoj: rusa kaj hebrea. La rekompenco estas tre modera. Prospektojn kaj provajn leterojn mi sendas al ĉiu, kiu sciigas min pri sia adreso.

Mia adreso estas:

Julius Levik, Berdiĉev (Rusujo).

### Enhavo de tiu ĉi numero.

	paĝo		paĝo
<i>Hospitium</i> de V. Gernet . . . . .	161	<i>Fonetike aŭ ortografie</i> de V. Ŝmurlo	171
<i>Novajoj</i> . . . . .	162	" <i>La sovaĝa popolo Esperanta</i> " de P.	
<i>El Francujo</i> de René Lemaire . . . . .	165	<i>Nylén</i> . . . . .	172
<i>Kelkaj vortoj pri la artikolo: "Kiel</i>		<i>De niaj abonantoj</i> . . . . .	174
<i>faciligi ellernadon de nia lingvo?</i> de		<i>Admonoj ĵurnalistaj</i> de P. Ahlberg . . . . .	175
<i>V. Gernet</i> . . . . .	168	<i>El Lermontov</i> de S. Sviridov . . . . .	175
<i>Fantazio</i> de Ikso . . . . .	169	<i>Smolensk</i> priskibo de A. Z. . . . .	175
<i>Tri malliberuloj</i> (poemo) de I. Lojko	170	<i>Anoncoj</i> . . . . .	176

Kun tiu ĉi numero estas dissendita Almetajo, anoncanta libron eldonotan de s-ro P. Lengyel.